# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG 4 N° 2 FEB./MA 1984

ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU

Nia ĉi jara ĝenerala jarkunveno, al kiu vi ĉiuj estas invititaj, okazos je sabato 24-a de marto ekde 14.00 h. en ESPERANTO-DOMO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN.

Ĝi estos antaŭigata de administrantara kunsido, al kiu ĉiuj respondeculoj de nia Flandra movado estas invititaj.

En la tagordoj troviĝos inter alie, krom la (re)elekto de nova estraro kaj prezidanto, la estonta financa programo kaj plia agado k.s.

Ne maltrafu ĝin.

--------

Posedantoj de MANLIBRETO POR LA ESTRARANO kaj de ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO, bovolu aldoni/korekti jenon :

KORESPONDA SERVO - nova adreso

Koresponda Servo Mondskala (KSM)
p/a Robert Llorens, Les Hortensias 2, 121bis Boulevard Napoléon III
F-06200 NICE, Francio.

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto.
Jarabono : BF 150,-

---

| | |
|---|---|
| FLANDRA ESPERANTO-LIGO | Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00<br>Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 |
| Prezidanto<br>Informado/Planado/Agado | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT - 03/666 62 66 |
| Estrarano pri Financoj | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM 053/77 44 97 |
| Sekretario | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL 03/449 50 06 |
| Direktoro de GCA<br>Librotenado | Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN |
| Junularo | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL 03/449 50 24 |
| Intergrupa Agado | Hilde Van INGELGEM-VANDRIESSCHE , Arbeidstraat 21<br>9300 AALST<br>Trees DOOMS, Knaptandstraat 36<br>2700 St. Niklaas |
| Provincaj prezidantoj | Brabanto : M. Th. HENQUINEZ, Lipsestraat 166<br>2991 TILDONK<br>Limburgo : Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113<br>3558 HELCHTEREN 011/53 64 10<br>Okc. Flandr.- Roland ROTSAERT, Visspaanstraat 97<br>8000 BRUGGE 050/33 00 04 |
| Kadrokursoj | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN |
| Literaturo/Eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN |
| Gazetara Servo | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b.4, 1500 HALLE |
| Sciencoj | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT |
| Cibernetiko | Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT |



## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 3-a de marto 1984 en Antverpeno.

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Paul Peeraerts (PP), Roland Rotsaert (RR),
Edward Symoens (ES), Kristin Tytgat (KT), Jules Verstraeten (JV)
Hilde Van Ingelgem (HVI), Jan Bovendeerd (JB)
Prezidas : ES
Protokolas : JB

1. La protokolo pri la estarkunsido de 14 01 1984 estas unuanime aprobita.

2. Raportado pri plenumitaj taskoj

2.1.1. JB petis al UEA kaj al Heroldo de Esperanto publikigi nian alvokon pri la planita kolokvo okaze de la kongreso en Aalst.
La alvokoj aperis kaj respondis ĝis nun unu persono (kaj ankoraŭ flanke de la temo !)

2.1.2. JB ricevas el la manoj de ES la liston de la lokaj radiostacioj en Flandrio. Ekzistas da ili 445 !
JB zorgos por la distribuado al la grupoj post klarigoj de niaj planoj en la ĝenerala jarkunsido.

2.1.3. JB raportas ke li ricevis telefonadon de Anne Tilmont rilate al punkto 6 de la antaŭa protokolo, do pri la reprezentado de FEL en la Kultura Konsilantaro de Antverpeno. AT, kiu jam reprezentas LA VERDA STELO-n kun Andre Staes kiel anstataŭanto, proponas reprezenti samtempe FEL-n. Konsentite.

2.1.4. La konvokado por la ĝenerala jarkunsido okazos pere de ESPERANTO PANORAMA
Kvankam PP anoncas malgrandan malfruiĝon, E° Panorama devas atingi la membrojn ĝustatempe.

2.2. Rilate al la planita Markola Kongreso en 1985-a aprilo, RR ricevis letero de UEA konfirmante ke je tiu periodo ne okazos alia organizaĵo.

2.3. ES rekontis H. Deceuninck je 24 01 1984. Li insiste petis lin konkretigi la Gazetaran Servon, sed ankoraŭ ne ricevis respondon.

3. Financoj

3.1. Post tre detala eksponado fare de PP de la bilanco kaj rezultatkontoj, konstateblas ke la deficito malpliiĝis 1/4. Tamen, malgraŭ tio bankroto minacas.

3.2. Kiel eviti tiun ?
Laŭ PP per malŝarĝi la Centron de la administrado de la membraro, libroservo, kursoj kaj de la tajpado de tekstoj. Se tiuj taskoj povus esti transprenitaj de volontuloj, ni retrovus grandan parton de niaj elspezoj.

3.3. Du taskoj jam transpreniĝis : la membroadministrado estos prizorgota de JB post interkonsento kun PP; la libroservan administradon transprenos ED

La du ceteraj postenoj do vakas. Ni klopodu trovi bonvolemulojn.

4. Kolokvo
ES opinias necese persone kontakti homojn verŝajne kapablajn por kunlabori en la programo. Tamen la afero devas esti klare eksplikita.
ES preparos tekston kaj interkonsentos kun JB por la dissendado al tiuj personoj kiuj ŝajnas al ni interesaj.

5. Radiostacioj.
En la ĝenerala jarkunsido estos pridiskutita tiun ĉi temon. La celo estas ke la grupoj sendu regule siajn programindikojn al la stacioj de sia regiono eventuale pere de antaŭpreparitaj komunikiloj. Aliflanke FEL prizorgu interesajn komunikojn ĝeneralajn.

6. Jubilea Jaro
6.1. JB telefonis al la sekretario de Klubo 100, sed ne sukcesis trafi lin. Ĉar la protokolo pri la lasta kunsido ankoraŭ ne aperis, li ne povas raporti pri la kunsido.
6.2. Pri la ekzamenkomisiono ankaŭ ne estas novaĵoj. JB skribis al S-ro Ragnarsson por peti antaŭsubskribitajn atestilojn (diplomojn), sed ne ricevis ian ajn respondon.

7. Kadrokursoj : Pro malĉeesto de A. Staes, nenio estas direbla.

8. FLEJA
8.1. KT memorigas pri la promeso farita de FLEJA pri investado de mono en nia Verda Konto. Tio ankoraŭ ne eblis, ĉar ili ankoraŭ atendas la subvencion de la ŝtato por la junulararanĝo en Lichtaart en 1982.
8.2. Rilate al la kongreso en Aalst, FLEJA konstatas ke la programo enhavas junularan aranĝon. KT esperas ke la orgnaizantoj ne hezitos alvoki al FLEJA por kunlabori en tiu programo.
8.3. FLEJA preferas proponi kandidaton por la prezidanteco de FEL, opiniante ke FLEJA ne estas subsekcio de FEL, sed memstara, jes kunlaboranta, [...]io.

9. ESPERANTO PANORAMA
9.1. La eksperimento kiun faras LA VERDA STELO estos pli detale priparolata okaze de la ĝenerala jarkunsido kaj eventuale proponita al la aliaj grupoj.
9.2. Same la uzado de la flavaj folioj metitaj je la dispono de la grupoj.

10. Preparo de la ĝenerala jarkunsido
10.1. La tagordo estu pli malpli jena :
- raportado diversa
- eksiĝo de la malnova estraro
- elekto de nova estraro kaj prezidanto
- planado de la venonta agado.

10.2. JB proponas komenci la kunsidon per ne tro longa festparolado. Tio permesus komenci la veran kunsidon kun kiel eble plej kompleta publiko.
Li proponas Leo De Bruyne pri Monda Turismo.
Konsentite. Tamen al li estu petata limigi sin al la jamaj atingoj de Monda Turismo por ke la ĉeestantataro havu ideon pri kio jam ekzistas.
10.3. La ĝenerala jarkunsido estu antaŭigata de administrantara kunsido. En la progrmao troviĝu ĉefe la financan programon kaj grupan administradon. Aliaj punktoj estas : propono de RR rilate al leterpapero, de JB proponita komunikiloj por radiostacioj, la stato de nia membraro, provinca agado, vendado de subtenkartoj, la eldonfonduson k.c.

11. KONGRESO 1985
Ni ankoraŭ ne tro vis kandidaton por organizi kongreson en 1985. Tamen, ĉar jam okazos Marbola Kongreso en Bruĝo, decidiĝas ne konkurenci ĝin kaj ne okazigi FEL-kongreson en 1985.
Tio signifas ke ni devas trovi kandidaton por 1986.

12. JB proponas tekston senditan al la Kultura Konsilantaro en Mortsel por alvoki al kunlaboro en la kolokvo. Li volus ĝin prezenti al la grupoj kun la peto fari samon en iliaj komunumoj.
Konsentite.

13. JB ankaŭ ricevis regularon de la Flandra Registaro pri premio aljuĝota ĉiun trian jaron por tradukado de Belga verko el la Nederlanda lingvoteritorio kaj por distribuado translima. La teksto kaj alvoko aperos en ESPERANTO PANORAMA por atingi kiel eble plej larĝan publikon.

14. Propaganda broŝuro"ESPERANTO, rajto je komunikado" de UFE
PP petis prezindikojn al UFE rilate al tradukado kaj eldonado de tiu ĉi boŝuro. Niaj financaj rimedoj tamen ne permesos ion tian.
JB skribos al UFE ke FEL devas rezigni pri la plano.

15. Diversaĵoj
Laŭ indikoj de Esperanto Centro Nederland verŝajne la nov vortaro Esp. Nederl./ Nederl. Esp. aperos en 1984.

Fino de la kunsido : 15.22 h.

---------------------- JB

## K E L K A J   K O N S I D E R O J

Naturan socion regas paco, bona volo, reciprokemo kaj antaŭvidemo. (Jose Ortega y Gasset).

Tiu socio bone funkcias, kies membroj estas pretaj fari tion, kio devas esti farita.

En bone funkcianta socio estas multe da farendaj aferoj kaj, kompreneble, ne ĉiu povas fari ĉion. Ĉiu havas specifan taskon kaj devas plenumi tiun sian taskon. Mi emfazas sian taskon.

Taskoj estas diversaj kaj diferencaj, de prezidanto ĝis simpla membro, sed ĉiuj estas gravaj en sia propra kampo. Kompreneble, la diferencaj taskoj ne estas nepre kompareblaj, sed jes same gravaj kaj kunigeblaj.

Se prezidanto respondecas pri la ĝenerala funkciado kaj reprezentado de la socio, sekretario pri la administrado kaj kunordigado, kasisto pri financaj aferoj, ceteraj estraranoj pri ceteraj, necesaj ĝeneralaj kaj/aŭ specifaj aferoj, la membroj respondecas inter alie pri provizado de la necesaj bazaj bezonoj por permesi al la estraranoj bone plenumi siajn estrarajn taskojn. Ekzemple pagi sian kotizon, partopreni en la movadaj programoj, ne kaŝi sian Esperantistecon kaj tiel, do, rekte propagandi.

Certe, multaj inter ni konas kazojn en kiuj difinita persono jes akceptis taskon, sed ne bone plenumas ĝin. Ĉu pro tio ili estas reproĉindaj ? ĉu admonindaj ?

Ŝajnas al mi, ke ni tutunualoke esploru aŭ analizu la situacion. En kiuj cirkonstanoj li/ŝi akceptis la taskon ? Ĉu libervole, memprezente, ĉu instigite de alia persono eventuale kontraŭvole ?

Ni jam konstatis, ke homo kiu bone plenumas akceptitan taskon, ĝenerale estas homo kontenta pri ĝi. Gravas scii kiu vere estas kontenta. Jam tiu, kiu persone spertas rezultaton de sia agado kaj/aŭ aprezon pro ĝi.

Kompreneble, ni ne mistaksu la realecon. Homo ja havas strangan sintenon, ĉefe rilate al si mem. La dirajon : "studento estas profesoro antaŭ ol esti studento" ne estas nur anekdoteca fantaziaĵo. Ni memoru nian propran junaĝon, nian lernejan/studentan periodon. Ĉu vi memoras ke, kiam ni lernis ion novan kaj interesan, ni tuj havis la impreson komplete koni la aferon, estis arde entuziasmaj pri ĝi kaj laŭte pri-



diskutis, preskaŭ 'profesoris' ĝin ? Nur poste, ju pli da kono ni akiris, des pli ni konvinkiĝis ke fakte ni ne konas la aferon kaj ke necesis studi... esti studanto.

Komparu tion kun novaj esperantistoj. Ĉu en la komenco ankaŭ ili ne estas arde entuziasmaj kaj profesoremaj ? Kiom da fojoj ni ne vidas defili novajn elementojn kun elstarai ideoj, kiuj miras pri la malmulto jam akirita de la malnovaj esperantistoj kaj respondeculoj de la movado kaj kiuj havas tute pretan solvon tuj realigeblan. Kaj ... kiom da fojoj ni revidas ilin ? Post kelkaj fojoj, neniam plu ! Kompreneble, ĉar ili ne vidas rezultatojn. Jen personoj nekontentaj kaj pli ol verŝajne perditaj. Ni tuj povas diri, ke tiaj elementoj ne estas interesaj, ĉar nerealismaj. Tamen ili povas esti danĝeraj ekzemple kiam ili havos pli da sukceso en kontraŭstaranta kampo.

Ĉu, do, ni ne devus esti pli atentaj pri tio en nia eduka programo ? Ĉu ni ne devus speciale atenti la edukadon mem kaj eviti ke elementoj forlasu niajn rangojn, ofte tuj post la lernado de la lingvo ? Ĉu ni ne zorgu ke ili forlasos la kursojn sufiĉe realismaj ?
Ĉu jes ?
Tiam ni tuj revenas al punkto jam ofte priparolita, solvo jam ofte prezentita. Ni mem, kiuj akceptis la taskon gvidi kurson aŭ klubon devas se necese zorgi ke ni mem estu bone preparitaj kaj formitaj por alfronti tiajn problemojn. La ebleco ekzistas jam kelkajn jarojn. Ĝin preparis kaj disponebligis la estraro de FEL : la KADROKURSOJ.

Jen plia tasko, kiu devus esti bonvole plenumita. Certe, ankaŭ la fenomenoj 'tempo' kaj 'distanco' estu enkalkulitaj kaj tie ni - ĉiu havu sian vicon - revenas sur la terenon de la organizantoj mem. Sed ĝuste tie ankaŭ kunlaboro estas necesa, de el la grupoj al la regionaj, de el la regionaj al la landaj respondeculoj, ekz. tra nia komisiono pri grupa kaj regiona agado.

Vi do vidas, ke fakte nia movado povas bone funkcii nur se ĉiuj taskoj kunaj formu reton. Ili devas esti samtempaj, daŭraj kaj koheraj. La tuto devas esti 'koncerto' de komuna agado.

Por tio la movadaj kvalitoj devas esti bonaj ĉiu-nivele. Ĉiu inter ni devas havi la kuraĝon akcepti sian respondecon kaj kunlabori, ĉiu laŭ sia kapablo.

Ne forgesu ke ankaŭ la kvalito de la estraranoj estas parto de la respondeco de la membroj. Estas ja ili kiuj elektas ilin, alivorte indikas la personojn kiujn ili konsideras kompetentaj por reprezenti

ilin kaj sekurigi la bonan funkciadon.

Do, tro facila akcepto de kandidato ne ĉiam estas akurata. Oni ne elektu ekzemple pro la nura kialo, ke ne estas alia kandidato. Tio ja povas esti danĝera. Se estas vera tio, kion diris Zamenhof : "Lingvo ne estas internacia nomante ĝin tia", ankaŭ estas vere ke "homo ne estas kompetenta nomante sin tia".

Tio, kion mi volas diri estas, ke ofte la 'publiko' pli bone vidas kaj rekonas la kvalitojn de individuo ol la individuo mem. El tio sekvas ke la publiko, en nia kazo nia membraro - vi, do - devas zorge elekti kaj esprimi viajn dezirojn pere de balotado, surbaze de la kvalitoj de la kandidatoj kaj ne stulte - pardonu, seninteresite akcepti ĉiajn kandidatojn.

Jen plia task͜aro, do, kaj ĝuste tiu ĉi estos tre aktuala en nia venonta ĝenerala jarkunsido je sabato 24-a de marto.

Bonvole montru ke vi interesiĝas en la afero. Venu kaj faru vian 'balotan devon' por la bono de nia ĉies movado.

Dankon kaj ĝis tiam.

Josuperter.

-----------------

K L U B O  1 0 0

Ni bedaŭras ke ni ne povas publikigi la pliajn aliĝintojn al la klubo. Ni ne sukcesis trafi la respondeculon por ekhavi la nomojn.

Venontan fojon ni esperas esti pli kompletaj.

-----------------